Une fois de plus, nous organisons sous l'égide de la Fédération FRANCE-EST pour l'ESPERANTO un stage qui permet de commencer l'étude de la langue internationale ou de parfaire ses connaissances. La Fédération Culturelle France-Est pour l'Espéranto est membre de l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, agréée par le Ministère de l'Education Nationale. Le succès de ces rencontres culturelles est toujours très grand.

Nous invitons tous les espérantistes de notre région, des régions et pays voisins (Allemagne, Belgique, Luxembourg) à notre stage qui aura lieu à la "MAISON DE L'ASNEE" à VILLERS-lès-NANCY, les samedi 25 et dimanche 26 octobre 1986.

CINQ COURS A NIVEAUX MULTIPLES!!

COURS A1 Si vous n'avez aucune notion d'espéranto. Livre utilisé: "METODO 10".
Animateur: E. LUDWIG

COURS A2 Si vous êtes déjà à mi-chemin d'un cours élémentaire ou si vous avez participé à un stage.
Livre utilisé: "METODO 11".
Animateur: M. GUILLAUME

COURS B Si vous êtes parvenu au terme de votre apprentissage élémentaire.
Livre utilisé: "METODO 12".
Animateur: J.-P. COLNOT

COURS C ..."krokodilo malpermesata"...
Pour peaufiner vos connaissances.
Livre utilisé: "Ĉu rakonti novele?"
Animateur: P. DENIS

COURS D Sur les pas d'un grand auteur.
Livre utilisé: "-dokumentoj surloke-"
Animateur: E. BORSBOOM (Pays-Bas)

Veillez détacher (ou recopier) le bulletin d'adhésion ci-dessous et le faire parvenir avant le 15 octobre 1986 à l'adresse suivante:

Mme Madeleine ROUX
9, square Aristide BRIAND
F-54500 VANDOEUVRE

Les stagiaires français voudront bien y joindre un premier chèque d'inscription (du montant -ou d'une partie du montant- de l'adhésion), chèque postal ou bancaire, au nom de "CLUB D'ESPERANTO" - CME 54. Ce chèque sera envoyé à Mme ROUX, parallèlement à l'envoi du bulletin d'inscription. Les stagiaires étrangers s'acquitteront de leur dû sur place.

24^{ème} stage d'espéranto = 25/26 octobre 1986

BULLETIN Veuillez cocher les cases concernées
— d'adhésion — Jour et heure d'arrivée:

NOM et PRENOM:

ADRESSE:

... de départ:

Je réserve lit(s) dans une chambre

par train par voiture

à 1 lit à 2 lits nuit supplém. éventuelle le vendredi

Je fournirai mes draps Je n'apporterai pas mes draps

Je réserve des repas, le samedi soir pour personne(s)

le dimanche à midi pour personne(s)

T.S.V.P. !

PROGRAMME

SAMEDI 25 OCTOBRE 1986

- = de 13h à 14h15: arrivée et accueil des participants.
- = 15h: 1er cours (chaque séquence dure 45mn, puis pause 15mn)
- = 18h30: service de librairie.
- = 19h: repas pris en commun.

à 20h30 : soirée - détente avec le TESPA ... THEATRE ESPERANTISTE PARISIEN

dimanche 26 octobre

- = de 8h à 8h30: petit déjeuner
- = 8h45: reprise des cours.
- = 11h45: service de librairie
conversations amicales
- = 12h30: repas en commun.
- = 14h: réunion du Comité de la Fédération.
cordial au-revoir aux stagiaires!...

EXAMENS

Le dimanche matin pour les stagiaires volontaires des cours B,C et D.

FRAIS DE PARTICIPATION

INSCRIPTION: 55F + 35F (abonnement à LA INFORMILO) pour les non-membres de la Fédération.

55F pour les abonnés, les membres de la Fédération et leur famille.
40F pour les 12 à 18 ans.
Gratuité au-dessous de 12 ans.

REPAS: samedi soir, 44F - dimanche midi, 49F

CHAMBRES: (et petit déjeuner pour une personne)
64F (draps fournis par la Maison)
48F (draps apportés par le stagiaire)

SERVICE DE LIBRAIRIE (Notre catalogue général sera inséré dans le N°55/Septembre 86 de LA INFORMILO)

Tout espérantiste motivé achète au moins un livre par an... Pour éviter les frais de port, un bon conseil: passez commande avant le stage; vous découvrirez vos livres à l'arrivée...

Les manuels destinés à votre stage (à cocher sur le bulletin d'inscription) seront à votre disposition sur place et payés de même.

Je m'inscris au cours A1 A2 B C D

Je suis candidat à l'examen "Atesto pri lernado"

"Atesto pri praktika lernado"

"Atesto pri kapableco" (écrit)

Je suis abonné à "LA INFORMILO" Je ne suis pas abonné à "LA INFORMILO"

Je réserve le livre METODO 10 METODO 11 METODO 12 ĈU RAKONTI NOVELE?

24^o staĝo de parolata esperanto



SABATON, 25an de oktobro 1986
kaj DIMANĈON, la 26an

"MAISON DE L'ASNEE"
Rue de Laxou
54600 F-VILLERS lès NANCY



Sub la ŝildo de la ORIENT-FRANCA KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO, membro de U.F.E., agnoskita de "MINISTERE DE L'EDUCATION NATIONALE", la E^o-Grupo de NANCY kaj ĉirkaŭaĵo organizas tiun staĝon. Tiel, ĉiuj gelernantoj, plej parte izolitaj ne sia vilaĝo aŭ urbeto, povas renkontiĝi kaj ĉiuj havas sekve la eblecon praktiki esperanton.

Samtempe ni invitas ĉiujn esperanto-praktikantojn (ankaŭ komencantojn!) en najbaraĵregionoj de Francio kaj en Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni por praktike kaj konkrete uzi kune la Internacian Lingvon.

ESTOS 5 KURSOJ

- KURSO A1 Por tuj komencontoj.
Libro: "METODO 10" Gvidanto: Sr^o LUDWIG
- KURSO A2 Por ĵus komencintoj, kiuj atingis la duonon de la unua-grada kurso aŭ partoprenis jam unu staĝon.
Libro: "METODO 11" Gvidanto: Sr^o GUILLAUME
- KURSO B Por tiuj, kiuj finlernis la unua-gradan kurson.
Libro: "METODO 12" Gvidanto: J.-P. COLNOT
- KURSO C La lingvo-posedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvo-posedon.
Libro: "Ĉu rakonti novele?" Gvidanto: S-r^o DENIS
- KURSO D Enkonduko al sennaciismo.
"La vivo de LANTI" Gvidanto: Sr^o BORSBOOM

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii la ĉi-suban ĉekon kaj sendi ĝin antaŭ la 15a de oktobro 86 al

S-in^o Madeleine ROUX
9, Square A. Briand,
F-54500 VANDOEUVRE

kun via poŝt- aŭ banko-ĉeko je la nomo de CLUB d'ESPERANTO - C.M.E. 54 (antaŭpago parta: 55F). Eksterlandanoj prefere pagu surloke... sed nepre sendu sian aliĝilon!

24a staĝo - 25/26ajn de oktobro 86

ALIĜILO

S-r^o S-in^o

NOMO: ANTAŬNOMO:

ADRESO:

Tago kaj horo de alveno:

de foriro: trajne
aŭtomobile

Mi rezervas lito(j)n en ĉambro kun 1 aŭ 2 lito(j) sabate vespere.

Mi rezervas manĝojn sabate vespere por persono(j), tagmeze por persono(j).

bonvolu turni →



bonvolu krucumi laŭnecese en la etaj kvadratoj

LA 8an kaj 9an de marto 1986

raportas
Catherine ROUX
Sekretario

La 45a Kongreso de la Kultura Orientfranca Federacio okazis, dank'al la senlaca kaj sindonema laboro de nia samideanino Marthe NAU, en teknika liceo de MONTIGNY-LES-METZ. Aliĝis kvardeko da partoprenantoj, inter ili gastoj el LUKSEMBURGJO kaj GERMANJO. Ni aparte menciu la ĉeeston de Martin HAASE, Prezidanto de T.E.J.O. kaj de Thomas BORMANN.

II/ Staĝ-kongreso :

Por la unua fojo, ni spertis samtempe la komunan organizon de staĝo kaj de kongreso. Sabate posttagmeze, funkciis du kursoj, gviditaj de S-ro GREJNER (por komercantoj kaj de S-ino TRJOLLE (por progresantoj). Dume, S-ro Walter JEŁAZNY prelegis pri interesa temo : "La 100-jariĝo de E° kaj ties perspektivoj". Tamen, post la prelego, ekestis viglaj diskutoj inter la diverstendencaj partoprenantoj rilate multajn devojiĝojn de la temo, aparte, la situacion sine de Pola-E°-Asocio.

III/ Labora kongreso :

Dimanĉe matene okazis la ĝenerala laborokunsido de nia Federacio.

A/ Raporto de la grupoj :

La partoprenantoj aŭskultis la raportojn el la diversaj Kulturaĵ Centroj de nia Federacio, nome : EPINAL NANCY, BAR-LE-DUC (apartaĵ gratuloj inu al S-ro François-Xavier GILBERT, dank'al kiu aperis en la Komerca kaj Industria Cambio de MEUSE 4-lingva repertuaro de komercaĵ vortoj kaj belan E-a-n artikolon pri la ribo-ĵeleo), BETSCHDORF (nova grupo, kiu eklaboras vigle dank'al S-ino SCHEJDEL), COLMAR, MUNSTER, STRASBOURG, MONTIGNY-LES-METZ, MULHOUSE kaj THIONVILLE

B/ Administraciaj raportoj :

1) Raporto pri la P.K.K. :

La Prezidanto de la Federacio legas la raporton, pro ne-ĉesto de S-ro COLNOT (li alvenis pli malfrue pro subita ekmalŝanĝo de lia edzino), ties respondeculo. Montriĝas malpli da intereso en ALZACO pri la P.K.K.. Tamen, la reklamkampanjo bone efikis kaj permesis plialtigon de la varbitoj. Okazas lernado de E° en la kancerjoj, ĉar kelkaj malliberuloj profitas tiun okazon, por havi fruan liberiĝon. Ili eĉ ricevis la permeson iri al GREZJONO, por trapasi la Atesto-n pri Kapableco. Tio estas fakta agnosko de E° fare de la BADJINTER-a administracio.

2) Agadraporto :

Ĝi estas legata de la sekretario kaj unuanime akceptita.

3) Financa raporto

Ĝi estas prezentata de la kasisto. Leveĝas demandoj

demandoj rilate la donacojn la re-aperon de la ekspozicia amotizo novan manieron por prezenti la re-kotizintajn abonantojn.

S-ro DENJS klarigas la novan sistemon por la abono al "La Informilo". La homoj devas pagi aparte kaj rekte sian abonon al la gazeto, kaj la kasisto insistas pri la fakto, ke tio estas pli bone farenda frue en la jaro, t.e. en januaro.

Okazis ankaŭ diskutoj pri la statutoj kaj membriĝo al U.F.E.. S-ino TRJOLLE tre klare respondis al ĉiuj demandoj. La kasraporto estas adoptita per 20 voĉoj por kaj 2 sindetenoj.

4) Agadproponoj

- La apero en FRANCO de oficiala informilo teknika, kiu uzas 4 lingvojn (inter ili E°-n) estis surprizo por la ĵurnalistoj. Venis reagoj el gravaj francaj ĵurnaloj, kiel "La Mondo". Tio des pli gravas, ke tiu dokumento estos sendata al ĉiuj ambasadoroj, kiuj tiel ekscios pri E°. S-ro GILBERT petas, ke oni sendu al li ĉiujn presartikolojn pri la dokumento, aŭ favorajn, aŭ malfavorajn.

- Daŭnos la konstanta laboro ĉe la Akademi-Inspektoroj.

- Daŭnos la laboro de S-ro COLNOT, kiu estos helpata por la reklamkampanjo. Jam de 34 jaroj li faras tiun gravan laboron por la P.K.K..

- Eklanĉo de abonkampanjo al "E°-Actualités" al ĉiuj gravaj sferoj, por informi ilin serioze pri E°. Necesas kolekti ĉiujn adresojn, al kiuj la Federacio povu sendi "E°-Actualités". Okuzus diskutado kaj interŝanĝoj de spertoj en la sfero de la liberaj radioj.

- Pli bona funkciado de la ekspozicia rondvojaĝo.

- Reklamado pri la Nacia Kongreso en GERARDMER.

- Diversaĵoj : Sekve de lia sabata prelego, S-ro JEŁAZNY insistas, por ke la Federacio prenu firman pozicion pri la eventoj sine de Pola-E°-Asocio (lorigo de ties estaro far la pola registaro). Laŭ propono de S-ro GILBERT, la kongresanoj unuanime decidas,

- ke nia Federacio skribu al U.F.E. ;

- ke U.F.E. transdonu nian demandon al U.E.A. kaj informiĝu siaflanke ĉe U.E.A. pri la polaj eventoj kaj la disvolvo de la U.K. en VARSOVJO ;

- kaj bedaŭras, ke U.F.E. ne estis informita oficiale de U.E.A. kaj ne povis averti siajn Federaciojn.

C/ Elektado de novaj komitatanoj :

- S-ro DENJS : 21 voĉoj

- S-ro GUYLLAUME : 17 voĉoj

- S-ino LÉPEIX : 19 voĉoj

- S-ro BARRIER : 21 voĉoj

IV/ Distra kongreso :

La distra vespero akceptis la "Groupe Folklorique Lorrain", kiu, pere de siaj tipaj kostumoj, prezentis al ni enkondukon al Lorraina kulturo dank'al tradiciaj dancoj kaj kantoj.

Dum la vespermanĝo, ni havis la plezuron ricevi la viziton de la urbestro de MONTIGNY-LES-METZ kaj de la licea estro.

Konkludo

Refoje re dankas S-ino-n NAU, kiu faris tiun sindoneman laboron malgraŭ malfavoraj sanaj cirkonstancoj

ESPERANTO JE LA SERVO DE LA PACO _____

Ĉu Esperanto ne havas sian lokon en pac-manifestacio? Ĉu internacia lingvo ne estas taŭga rimedo por strebi atingi pacon sur nia terglobo? estis la temo de la partoprenado de la esperantistoj de la trilanda regiono Svislando/Germanio/Francio.

La pac-marŝado okazis en paska lundo la 31an de marto en Bazelo. La Bazela Esperanto-Asocio invitis la grupojn de Mulhouse kaj Freiburgo (Breisgau). Kunmarŝis deksep samideanoj, de la centro de la malnova urbo ĝis eksterurba gimnazio, portante agadrubandon kaj surmetante agadsurtukojn, sur kiuj oni povis legi:

"ESPERANTO = POPOL INTERKOMUNIKADO = PACO"

En la gimnazio renkontiĝis la grupoj de ĉiuj flankoj, entute 2000 personoj. Dum la granda festo oni povis aŭskulti prelegojn kaj viziti budojn.

La esperantistoj deĵoris ce la E^o-budo kaj reklamis pri la lingvo, ĉu per german- aŭ franc-lingvaj dokumentoj laŭ la emo de la interesigantoj, ĉu vendis kelkajn libretojn de UFE: "Une approche...".

Eĉ la regiona radio "DREIECKLAND" el Strasburgo faris intervjuon.

Robert KUENY
Grupo de Mulhouse

VIZITO DE YAŠOVARDAN EN THIONVILLE _____

La hinda esperantisto, pri kies vizito ni anoncis antaŭe, restis 24 horojn en Thionville, la 23an/24an de marto. Lia mallonga restado estis plene eluzita de lokaj esperantistoj, ĉar efektive tia vizito estas unika okazo por vivigi esperanton kaj prezenti nin al la ekstera mondo. Li vespermanĝis kun grupo da geinstruistoj esperantistoj. La postan tagon, post intervjuiĝo ĉe REPUBLICAIN LORRAIN, okazis unuhora elsendo ĉe RADIO-BEFFROI, en esperanto kun interpreto en la franca, pri la vivo en Hindujo.

Tuj poste li estis gasto de "Thionville-Accueil", kie regule okazas E^o-kurso; la lernantinoj de la kurso invitis lin por tagmanĝo en agrabla restoracio. Sekvis la prelego pri Hindujo kaj ties ĉiu-taga vivo, en la ejo de Thionville-Accueil, preskaŭ tro malgranda por la kvardeko da ĉeestantinoj, esperantistaj kaj ne-esperantistaj. La prelego konsistis el prezento de diapozitivaj, kun komentoj en esperanto kaj interpreto en la franca. Tuj poste la preleganto devis forrapidi al Luksemburgo, por alia prelego.

Noto: krome anoncoj pri lia prelego estis faritaj ĉe alia loka radio (GSB).

C. NOURMONT

NANCY _____

La 2a-gradan kurso daŭras ĉiumerkrede je la 20a30, verŝajne ĝis la someraj ferioj. Kunvenoj ne plu okazis vendrede, sed la lastan merkredon de ĉiu monato (krom se ferioj). Ni kunvenas 4-ope por lerni kantojn en Esperanto (tiu kunveno anstataŭas la 2a-gradan kurson unufoje monate). En la "Activité-Espéranto-M.J.C." ni estis 15 membroj lastjare sed ĉi-jare nur 8...

J.-P. COLNOT

=====
=====

vidu informon en la
specifa rubriko...

ALIĜILO AL LA ESPERANTO-RALIO
(organizata de la GROUPE DES ESPERANTISTES MEUSIENS)

Côtes-de-Meuse = 7an de septembro, ek de la 10a matene

... "Nia vivo en...
BAR-le-DUC

Mi partoprenos la ralion

NOMO

ADRESO

numero da personoj

(Mi bone notis, ke mi ricevos siatempe detalitan teknikan dokumenton pri la ralio)

La grupo gastigis S-r^on YASOVARDAN la 25an de marto en salono de la urbodomo, kie okazis la prelego pri Hindio en la ĉeesto de cirkaŭ 20 personoj. Ankoraŭfoje ni menciis, ke tiaj prelegoj estas tre valoraj kaj ni bedaŭras konstati, ke nur 2 kluboj en nia tuta Federacio enŝoviĝis en la preleg-haltej-aro aranĝita de UFE, nome Thionville kaj Bar-le-Duc.

La klubo dungis komence de majo, junulinon, Catherine ZOL, en la kadro de la tiel nomata T.U.C. Ŝi jam deĵoris por kompili bibliotek-statistikojn; ŝi ankoraŭ zorgas pri raportoj, kuriero, ktp. Memevidente ŝi lernas E^on sub la gvidado de P. Denis, kiu paralele gvidas publikan kurson en la sino de la urba ĝemel-komitato.

Inter la aktivaĵoj de la grupo ni "emfazu" pri projekto de "ralio" okazonta la 7an de septembro, en regiono "COTES-de-MEUSE"(orienta parto). Tiukaze ni invitas niajn proksimajn -eĉ ne proks.!- samideanojn (METZ, THIONVILLE, NANCY, ktp.) partopreni tiun simpatian eventon, kiu konsistos el sufiĉe facila veturado / per propraj aŭtomobiloj / kun simplaj "enigmoj" solvendaj kaj kiu finiĝos per plenaera pikniko aŭ /se malagrabra vetero/ per manĝo en memserva restoracio de aŭtovojeĝo "A3".

Bonvolu laŭeble plenigi la enŝovitan aliĝilon cele bonan organizaĵon de la ralio. Detalojn teknikajn ricevos siatempe interesatoj.

Bonvolu sendi la ralio-slipon al: Pierre CANUS, 185, Rue de Véel, 55000 BAR-le-DUC



NIA PERKORESPONDA KURSO

Ni ricevis entute iom malpli ol 100 informpetojn kaj aliĝis 37 gelernantoj. El ili 7 ĝis nun finlernis M11. 4 nomoj aperis en la lasta "INFORMILO" (F-in^o Agnès Humbert-claude, NANCY - S-r^o Noël Pierrat, NANCY - S-in^o Suzanne Rominger, COLMAR - S-r^o Georges Verdier, GERARDMER). La 3 ceteraj personoj estas: S-r^o Peter HLAVAC, REIMS, gvidata de S-r^o Guillaume ... finlernis M11 en 1 monato! Gratulojn! S-r^o Michèle SCHMIDT (ASCHAFFENBURG, Germanio) gvidita de S-r^o Ludwig. S-r^o Jean LANSIAUX (REIMS), gvidita de F-in^o Roux. 6 el la 7 finintoj aliĝis al M12. El la lastjaraj gelernantoj, 4a finlernis M12. Temas pri S-in^o BROSSAUD en BOCA de AROA (Venezuelo).

Gratulojn al ĉiuj!

Jen la nuna rezulto sekve al kampanjo por disvastigi nian kurson:

1/ Varbis 9 gelernantojn: S-in^o Marthe NAU, Montigny-lès-Metz (S-in^o NAU ricevis la komunikojn destinitajn al la Mozela gazeto "LE REPUBLICAIN LORRAIN", aldonis sian adreson kaj zorgis pri apero de la komunikoj -kiuj senditaj el NANCY ĝenerale ne aperis- Krome ŝi respondis al informpetoj.

2/ Varbis 5 gelernantojn: S-r^o CROCHET, Epernay (Dank' al antaŭaj klopodoj de S-r^o Crochet, la Marna gazeto "L'UNION" tre volonte enpresas niajn komunikojn). Ĉiufoje mi aldonis la adreson de S-r^o Crochet, kiu tiel respondis al informpetoj.

3/ Varbis 2 gelernantojn: S-in^o BERNEZ, Chaumont (Ankaŭ tie mi aldonas la adreson de ŝi en komunikoj senditaj al "LA HAUTE-MARNE LIBEREE". Ŝi respondas al informpetoj).

Krome ekzistas 3 varbitoj en "68", kies "patreco" estas por ni ne certa. Kiu varbis ilin? Mi aldonu tamen, ke la 20 aliaj aliĝintoj estis varbitoj pere de rekta informado el Nancy al informpetintoj.

Gratulojn kaj dankon al ĉiuj personoj, kiuj partoprenis la kampanjon, eĉ se ĉijare ili ne sukcesis varbi iun. La ĉi-supraj sukcesintoj ŝuldas tion al jam plurjara agado en sia regiono.

J.P. COLNOT

Lastminute: Finlernis la kurson ... F-in^o Marie-Odile HUVET, NANCY, gvidita de S-r^o Degrelle - F-in^o Jacqueline PIERRAT, 88550 POUXEUX, gvidita de S-r^o Greiner - F-in^o Ghislaine COLLIN, 52400 BOURBONNE, gvidita de S-in^o BUSSER. - Krome aliĝis 38a lernanto.

Ni tamen volas atentigi vin pri tri gravaj eventoj aparte interesindaj...

= 4a franc-Germana Junulara Renkontiĝo, pri kiu ni jam informis en la lasta INFORMILO, kiu okazos de la 25a ĝis la 31a de aŭgusto en la Kultur-Domo de GRESILLON.


Informas: DOYE Daniel, 169, Av. de Choisy, F-75013 PARIS

... francaj gejunuloj... partoprenu!!!

= REJNA ESPERANTO-RENKONTIĜO en RASTATT... kun alloga programo! 24/26ajn de oktobro

Informas: Horst FISCHER, Steinmauernerstr. 22, D-7550 RASTATT

= ... kaj memevidente(!) nia 24a STAĜO de PAROLATA ESPERANTO en VILLERS-lès-NANCY, la 25/26ajn de oktobro, kies aliĝslipo troviĝas en ĉi-tiu n° de LA INFORMILO. Ni bedaŭras, ke ĝi okazos samtempe kiel la RASTATT-renkontiĝo.



PSSTT! ĈI-TIE NIA LIBROSERVO!...

La libroservantoj kore dankas la partoprenantojn de la Nacia Kongreso de GERARDMER. La granda tiea enspezo per mesos renovigon de la libroservo. Tiel ĝi povos ankoraŭ pli bone kontentigi siajn fidelajn uzantojn.

NIAJ NOVAJ KASEDOJ

"Baf!" (Ganfranko) 65F
De Pont-Aven al Varsovi' (Le Puil) 65F

SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ

Tekniko 24F
Komunikado 24F
Ter-scienco 24F

NOVAJ LIBROJ

Vortstatistikaj esploroj (Vatré) 18F

Eliginta glavo (opo)	18F
Kaŭkazaj rakontoj (Lermonton)	14F
Kaverno apud la Maro	73F
(noveloj: Bertram Potts: 230 p.)	
Kvardek vidindaj lokoj de Cinio	25F
Varsovio 1887	12F
Kun siaspeca spico (R.Schwartz)	86F
La poezio de la Patrolo	68F
...kaj la nova verko de <u>Johan Valano</u> :	
Ĉu rakonti novele?	47F

Ĉu la ŝipo dronis?... La menditaj libroj japanaj ankoraŭ ne alvenis!

*** —*** —*** —*** —*** —*** —*** —*** —*** —*** —***

K I E L A Ĉ E T I P E R K O R E S P O N D E ?

Vi sendas vian mendon al: LIBRO-SERVO, BP 23, 54510 TOMBLAINE (vi povas uzi la ĉi-suban mendilon)

Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kaj samtempe vian fakturon. VI pagas per ĝiro aŭ mandato al LIBRO-SERVO, CCP 2800-76 H NANCY, aŭ per bankoĉeko al LIBRO-SERVO. Ne prokrastu vian pagon...



Mi mendas jenajn librojn:

GRAVE: en nia venonta n° / 55-Septembro / vi malkovros kompletan katalogon de niaj libroj!
subskribo

Miaj nomo kaj adreso:

.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....

Esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj en 1986



moi! j'aime parler
esperanto...
alors, je participe! 17

Tiun kalendaron ni ĉerpis en la gazeto HEROLDO de ESPERANTO. Estas tute neeble en nia bulteno, doni detalojn pri la cititaj eventoj: vi-mem petu dokumentaron ĉe la aldonitaj adresoj.

Ni aparte deziras emfazi pri la tre riĉa somerprogramo de la Internacia Feria Altlernejo de la KULTURA CENTRO ESPERANTISTA en LA CHAUX-de-FONDS (Svislando), dum julio kaj aŭgusto.

Se vi ne povas aliloke kongresumi aŭ malproksimen vojaĝi, kaptu tiun okazon por konatiĝi kun tiu ideala feriejo en svisa montaro, kia estas la K.C.E.

Ĝi situas je 1100 m. super la marnivelo en tre konata kvartalo de la urbo, proksime de pastejoj, arbaro, belaj montosuproj. Ĉirkaŭe abundas promenejoj por migremuloj (kaj skiantoj dumvintre!). Laŭ moderaĵ prezoj, en 1/-, 2/- aŭ 4/-lita ĉambro, aŭ en loĝejo 2-lita, 4-5 lita vi ĝuos ege varmamikan etoson, dum vi kleriĝos diversmaniere.

— Jen eroj de la Somera Universitato:

= 30/6 5/7	Participaj sufiksoj en Esperanto	G. COOL
= 7/7 12/7	CSEH-Seminario	Audrey CHILDS
= 14/7 19/7	Familia Feriado (1)	
= 21/7 26/7	Familia Feriado (2) + E ^o Literaturo dum 99 jaroj.	I. SZERDAHELYI
=28/7 2/8	-id-	
= 4/8 9/8	"KALEVALA", la grandioza epopeo norda.	G. SILFER
= "	La tradukarto (el la franca)	G. LAGRANGE
	Latradukarto (el la germana)	D. WILLKOMMEN
= 11/8 16/8	Lertiĝo en la tradukarto (el la germana) (2)	
= "	Nia literaturo en la lastaj jardekoj	E. BORSBOOM
= 18/8 23/8	Internacia geografia kaj biologia feriado.	Wim de SMET

Adreso de la K.C.E.: Postiers 27, Poŝtfako 771, CH-2301 LA CHAUX-de-FONDS
Telefona: 039 26 74 07

La KULTURA ESPERANTO-DOMO de GRESILLON - F 49150 BAUGÉ, ankoraŭ organizas mulfacetajn restadojn dum la feriperiodo. Petu la specifan dokumentaron rekte ĉe la E^o-Domo!

ĈU VI NENIAM ĜUIS "GREZIJONO-n"?.. PROVU KAJ APREZU!

91. **29.VI.-20.VII. Grésillon:** Prelegoj, kursoj kaj ekskursoj

92. **30.VI.-6.VII. Trescléoux, Francio:** Esperanto-piedmigrado en Altaj Alpoj (G. Gabillon, 32 rue Renault, F-33200 Bordeaux).

97. **2-12.VII. Ardèche, Francio:** 2-a Esperantista Piedirado (Kresta Stelo, 8 rue des Oulière, F-26400 Crest).

101. **6-12.VII. Bouresse, Francio:** Esperanto-staĝo pri teatro

102. **8-18.VII. Challans, Francio:** Internacia Renkontiĝo de esperantistaj instruistoj de Freinet-pedagogio (P. Poisson, 239 rue V. Hugo, F-7450 St. Cyr-sur-Loire).

104. **12-19.VII. Louvain-la-Neuve, Belgio:** 20-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (E. van Damme, Albert I str., 44, B-1750 Schepdaal).

105. **13-19.VII. Mesnil-St-Pere, La Kvinpetalo:** Staĝo pri kanto kaj muziko

112. **20-25.VII. Veliko Târnovo:** IV-a Internacia Somera Esperanto-Universitato (BEA, pk 266, BG-5000 V. Târnovo).

113. **21.VII.-10.VIII. Grésillon:** Diversnivelaĵ internaciaj Esperanto-kursoj

117. **26.VII.-1.VIII. Valo Ordesa, Hispanio:** SAT-Antaŭkongreso (A. M. Botella, av. Compromiso Caspe 26, E-50002 Zaragoza).

119. **26.VII.-2.VIII. Ateno, Grekio:** 12-a Internacia Konferenco de "Neŭtrala Esperanto-Movado" (A. Sakellaropoulou, Aghias Paraskevis 30, Ateno 816)

120. **26.VII.-3.VIII. Rouillé, Francio:** 37-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (P. Cousson, 64 Le Hameau des Plaidis, Nouillé Maupertuis, F-86340 La Villedieu du Clain).

123. **2-9.VIII. Sant Cugat del Vallés, Katalunio, Hispanio:** 59-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (G. Moya, Balmes 36, Terrasa Barcelona).

128. **9-16.VIII. Bodman, FRGermanio:** Internacia Ferio-Semajno (M. Hector, Fuchsmattstr. 23, D-7602 Oberkirch).

129. **10-23.VIII. Grésillon:** Informatiko kaj Esperanto-kursoj

130. **14-20.VIII. Mesnil-St-Pere (Kvinpetalo):** Staĝo pri jurialismo de LF-koop

140. **29-31.VIII. Villingen:** Esperanto-Seminario (J. Schiff fer, Wilstorferstr. 58, D-7730 VS-Villingen).

165. **18-19.X. Avinjono, Francio:** 3-a Rondana Esperanto-Rendevuo

166. **24-26.X. Nevers, Francio:** Esperanto-renkontiĝo okaze de la 75-jara jubileo de la loka grupo (GEN, 15 rue Pierre-Emile Gaspard, F-58000 Nevers).

167. **25-26.X. Rastatt, FRGermanio:** 1-a Rejna Esperanto-Rendevuo, LF-koop kaj Bavelo



? U distrigita angelo



	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

HORIZONTALE

1 Juna nobelo(r) - de naĝbirdo - sufikso (r). Politi- tika unuiĝo - li ĉesis sian servadon (r) - prefikso
 3 Veki, krei (r) - por supren aŭ malsuprenlevi (r) - malalta arbedo en nekultiva regiono (r). 4 Por kap- ti fiŝon - insektmanĝulo. 5 Ĝi entenas la verecon (r) - monero - volva planto kun sonorilformaj flo- roj (r). 6 Kiu konvinke parolas (r) - pronomo. 7 por movigi la boaton (r) - simbolo de malmoleco - volvi, turni. 8 Sufikso - ĝi komencas la mangon - parto de biciklo. 9 Provizi iun per la necesa ma- teriala - adjektiva - pronomo. 10 Distri - mamulo insektmanĝulo. 11 Malgranda parto - speco de sambuko (r) - antikva vazo (r) - 12 Parto de eroti-

ko engraŭlo (r) - sensorgano.

VERTIKALE 1 Per ĝiaj beroj oni preparas ĝinon (r) - specio de palumbo. 2 Sudamerika mamulo(r) - guŝo (r). 3 Izatido taŭga por la konsumado. 4 Artiko (r) - ferika oksidhava tero (r) - sufikso (r) - por ĉirkaŭigi ion (r). 5 Longa metala stango - ĝardene aŭ subvitre kulturita arbedo (r) - adverbo. 6 Ege inklini al - rigidigi (r) Pulĉinelo havis du. 7 Reno - por suprenlevi akvon - vinberoj (r). 8 Por kunigi du partojn (r) - adverbo rabobirdo. 9 Ruĝbruna tero - paro - sur la kalkanoj (r). 10 Melankolia humoro (r) -ambio (r) - prefikso. 11 Helpi ŝteliston - adverbo - sufikso. 12 Dokumentujo - "dua mastro post dio".

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino tro- niĝas dekstre. La du "punktitaj" kolumnoj, vertikalaj legataj, elformas proverbon.

ade ado ak ar ĉi da ek eo ga is is ka klo la la la li lo lo ma man mo ne ni ni no no no no od ok oto pi ra re re reo rmo rn sul ta ta te ti to to tus ul umi va

- | | |
|--------------|----------------------------|
| 1 | svisa monto |
| 2 | reĝo de Itako |
| 3 | bone trakti iun |
| 4 | ne sincera ĉe krokodilo |
| 5 | unika en esperanto |
| 6 | genra nomo de glandinflamo |
| 7 | rajtigilo |
| 8 | penetraĵo |
| 9 | mardio |
| 10 | nazpurigado |
| 11 | supraĵe rigardi |
| 12 | pedante diskutaĉi |
| 13 | religio |
| 14 | divano |
| 15 | protektilo |
| 16 | regnestro |
| 17 | restanta kvitancero |

AM-FRENEZECO

... afiksa ekstravaganco!

Iam	krom ke..ŝi estu bela
estis ulo,	kaj eta,
kiu ade emis ami...	kaj hela,
do, am-ad-em-ulo.	kaj bruneta;
Sed, eĉ ne ero	do certe li estis
de prefero	-tute klare,
li montris	sen nebulo-
pri fraŭlino

... HELBRUNETBELULINETAMADEMULO

HEL-BRUNET-BEL-UL-IN-ET-AM-AD-EM-ULO!

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (n° 53)

KRUCVORTENIGMO: plumpa ŝoki ĝi oero eĉ aval ek loba remaĉul ene betul akre kuspi azen aer tern ekonom orn oĉj ist si grot noktuo te vane vaĉ fe al idumeo naiv to dik bistr ĉiel ikso duo met li

SILAB-ENIGMO: "parolo estas arĝento, oron similas silento".